

Ora Ĵurnalo

Numero 21, Septembro 2019



Al la tuta mondo:

*Bonvenon al la **verda** Gotenburgo!*

Bonvolu viziti nian retpaĝon:

www.esperanto-gbg.org

Enhavo


Enhavo	2	Ekskurso al la vitro-muzeo en Surte	26
Pri Ora Ĵurnalo	2	Sveda ministrino salutis la kongreson en Lahtio en flua esperanto	28
Espe-Porko meditas	3	Ĉu vi volus denove senti la finnan etoson? .	28
Promeno en Gotenburgo la 22an de aŭgusto 2019	4	Preparo por la Libro-Foiro 26–29 septembro en Gotenburgo	29
Promeno por vidi la "Judan Gotenburgon"	8	Mireille Grosjean – prezidanto de ILEI	30
Spuroj de honoruloj en Gotenburgo	9	Bo Sandelin legis interesan libron dediĉita al Ulrich Lins	33
"La Grandwitziro"	10	Marina du-oble-du... jen nia verkisto Sten Johansson	35
Pontus Fürstenberg – la granda artmecenato	10	Plupo kaj la Gruoj en Esperanto	36
Karl Warburg, la promociita profesoro je estetiko	11	Gufo en centra parto de Gotenburgo, GP raportas	37
Sophie Elkan – naskita Salomon	11	La kamphirundo	37
Mia sumigo	12	Stefan konstruas tankon	38
Valdemar Langlet – forgesita heroo	12	Doris Day	39
La kanto de Leonard Cohen en la jida kaj esperante	13	Al la patrin' demandis mi	40
Pete Seeger kantis en la jida	14	La Tago de Samarkando 2019	41
La plurlingva biblioteko	16	Esperanto-Kulturdomo en Grésillon informas	42
Raporto de Paulina, Pollando	17	Fungoj, en la sveda kaj en esperanto	43
La KELI-kongreso en Hungario en aŭgusto 2019	18	Kremeca kantarela pastaĵo por kvar personoj	44
Esperanto-Sabato 7 septembro 2019	21	El la magazino Veckan de la jaro 1904	44
Kelkaj tagoj sur la okcidenta marbordo	24		
Antaŭ 10 jaroj en la Gotenburga klubo okazis ekzemple	25		

Pri Ora Ĵurnalo

Ora Ĵurnalo estas eldonata de Ora Klubo, subtena klubo de la esperantolibrejo en Stannum, Östadsvägen 68.

Redaktantoj: Siv Burell, 070-721 34 79,
siv.burell@gmail.com kaj Ingegerd Granat, 073-502 53 32,
ingegerd.granat@telia.com. Fina paĝaranĝo: Andreas
Nordström, arendsian@hotmail.com.

Kontaktu iun el la redaktantoj kiam vi volas viziti la bibliotekon, ili malfermos al vi!



Espe-Porko meditas



☆ Nun estas aŭtuno kaj la ordinara laboro komenciĝas. Asteroj floras.

- ☆ Unue korektado koncerne numero 20 de Ora Ĵurnalo:
 - 1) La Konstanta Kongresa Sekretario ekde 2003, nomiĝas Clay Magalhães kaj nenio alia!
 - 2) Soile Lingman atentigas nin pri vortelekto: "La interna milito 1918 en Finnlando okazis inter la maldekstruloj kaj la dekstruloj, kiel en Hispanio. Estas la historiografio de la burĝaro, kiu nomis ĝin "milito por libereco". Tio validis dum multaj jaroj, sed nuntempe ne".
 - 3) ...kaj necesas distingi inter Turko kaj Turkio... kompreneble!!
- ☆ Someraj promenoj en Gotenburgo okazas – en suna aŭ pluva vetero. Nepras kunmeti sunokulvitrojn kaj ombrelon. El unu promeno rezultis, ke ni elektis judecon kiel temon por ĉi tiu numero.
- ☆ La Libro-Foiro en Gotenburgo okazos 26–29 septembro. 13 gotenburganoj deĵoros.
- ☆ Ĉi tiun fojon la Esperanto-Asocio de Gotenburgo ne estos ĉe la Globala Foiro sed sur la Plurlingva Foiro (Mångspråkstorget) en la komercista baza etaĝo. Ĉu ni sukcesos vendi pliajn librojn en tiu nova loko??? Ni vidu! Nia stando nomiĝas D04:16. Bonvenon!
- ☆ Unu el la temoj de la ĉijara Libro-Foiro estos Sud-Koreio. Andreas trovis du



koreajn librojn kaj Mireille Grosjean kontribuis per siaj spertoj de tiu fora lando.

- ☆ Espe-Porko ankoraŭ mense ne tute forlasis la UK-n en Lahtio. La saluto al la kongreso de sveda ministro en flua esperanto ja estas interesa novaĵo.
- ☆ Inspirita de la traduko de "Död amazon" en esperanton, fare de Sten Johansson, Tuomi Grundström el Lahtio sendis sian esperantan tradukon de la sveda kanto "Under fullmånen". Vi denove povos ĝui la tretorgenon de Eero Grundström kun kanto de Maria Kalaniemi.
- ☆ Libroj menciataj en ĉi tiu numero estas ekz: "Festlibro por Ulrich Lins", recenzita de Bo Sandelin, "Marina ĉe la limo" de Sten Johansson, "Plupo kaj la gruoj" kiel sonbendo kaj "Vojaĝo de Onia en Eŭropa" kaj "Vojaĝo de Onia en Japanio" de la korea verkistino KIM Onnuri.
- ☆ Pri teknikaĵoj ofte skribas Lasse Granat. Ĉi tiun fojon temas pri granda tanko.
- ☆ La 18:an de oktobro estos la "Tago de Samarkando". Anatolij Ionesov volas gratulmesaĝojn al imps86@yahoo.com.
- ☆ **Se vi havas leteramikon en iu fora lando, rakontu al Ora Ĵurnalo, kaj eble vi inspiros al plia reta leterskribado.**

Bonan aŭtunon! /Siv

Promeno en Gotenburgo la 22an de aŭgusto 2019

Ingegerd Granat gvidis kulturalan promenon por Ora Klubo.

La "kajo de la revoj" situas en Gullbergsvass. Ĝi ricevis la nomon de la Gullberget (la Ora Monto), kie la kastelo Skansen Lejonet situas. La areon oni nomis "la kanejo por vivteno de malriĉuloj" (Fattigförsörjningsvassen).



La gasturo – Gasklockan – kiu estis la plej elstara kaj grava konstruaĵo, estis malkonstruita en 2017. Ĉe la kajo de la revoj amaso de malnovaj ŝipoj ankriĝis por renovigo. Tempas, tempo pasas ...

Läppstiftet (la lipruĝigilo), tiu nubskrapulo, kiu laŭ popola diraĵo nomiĝis la lipruĝigilo, vere nur estis konstruaĵo de laboristoj kiuj havis "mizerhelplaboron de la komunumo". Gotenburgo volis krei laborojn kaj la entrepreno SKANSKA volis plifortigi sian socian prestiĝon kiel domkonstruanton. La konstruaĵo mezuras je 20 etaĝoj kaj situas ĉe "Lilla Bommen".



La barko Viking estas ŝipo kun kvar mastoj kiu estas barita en la kajloko 208 ĉe la placo de Lilla Bommen numero 10 en Gotenburgo. Viking estis konstruita en 1906 en Kopenhago kaj estas la plej granda velŝipo, kiu estis konstruita en Nordio. Viking velis sub alanda flago en malnovaj tempoj. Nun la ŝipo havas aliajn agadojn ol veli.

La operadomo en Gotenburgo havas mondan reputacion. La domo aspektas kiel ŝipo kiu ĵetis la ankron ĉe la granda urbo okcidente kune kun muziko kaj danco.



Por tiuj, kiuj interesiĝas, okazas hazardludado la tutan semajnon ĉe Packhusplatsen. Bedaŭrinde, ekestis neniu "Junulara Domo" je la tempo, kiam estis aktuale decidi pri la domo.



Li Wan Choung estis la nomo de kuiristo, kiu estis postlasita de ŝipo en Gotenburgo 1947. Post multaj vicoj tien kaj reen li revenis al Gotenburgo 1959 kaj startis la unuan ĉinan restoracion en Svedio, "Kinesiska Muren".

La komerca domo "Merkur" situas sur "Skeppsbron" en Gotenburgo intere en la dombloko Merkuro. La domo konstruiĝis en 1897 kaj estas bona ekzemplo pri arkitekta arto dum tiu tempo. La arkitekto estis Ernst Krüger. Hodiaŭ la Merkura domo estas tute malkonstruita krom la fronto, kiu estas por eterne laŭ la urba plano.



Jen estas tempo por la Magazeno. Svedio faris malmuntadon de la malnova kolonio "Svenska Sankt-Barthélemy". Tio estis sukcesa kaj en 1878 Francio transprenis la svedan posedon. La nura afero hodiaŭ, kiu rememorigas pri Svedio eble estas la nomo de la ĉefurbo "Gustavia".

Hodiaŭ estas eldonejoj en la malnova magazeno. Pluraj eldonistoj unuiĝis kun aliaj kulturaj aktivecoj kiuj ankaŭ havas siajn adresojn tie. Jen valora enhavo en la malnova magazeno sur la "Franska Tomten", la franca konstrugrundo.



Ĝis revido!

Kaj ne forgesu paroli esperanton! /Ingegerd

Promeno por vidi la "Judan Gotenburgon"

aranĝita de la "Västsvenska Författarsällskapet". Bonega gvidanto estis Tom Schulewitz.



Judoj longtempe troviĝas en Gotenburgo, almenaŭ tiom longe ke Gotenburgo estis vera urbo, do, ĉirkaŭ 400 jarojn.

La aŭtoritatoj bezonis homojn kun scio kiel konstrui urbojn. Judoj venis ekz. de Amsterdamo.

La Gotenbura sinagogo estis konstruita en 1855 de August Krüger [...] La diservo enhavas liberalajn, kontinentalajn ideojn, sed ankoraŭ viroj kaj virinoj ne sidas kune [...] Studvizitoj kun gvidanto eblas post interkonsento. Ekz. venas lernejoj klasoj de tempo al tempo.

Proksime al la sinagogo troviĝas kortuŝa memoraĵo pri la naziistaj perfortoj en Budapeŝto kontraŭ judoj, eĉ infanoj. Ili estis starigitaj kaj mortpafitaj sur la bordo de la rivero Danubo. Apude staras "tordita" fosto kun ĉiam brulanta torĉo sur la pinto.





La promeno finiĝis ĉe la monumento de Raoul Wallenberg, kiu savis multajn judojn en Hungario.

Ĉu ne indus starigi monumenton de Waldemar Langlet apude?

Ni demandis al nia gvidanto, Tom Schulewitz, ĉu li konas Langlet? Jes li konis lian nomon.

/Inga kaj Siv

Koran dankon al Västsvenska

Författarsällskapet pro interesa promeno. /Siv

Spuroj de honoruloj en Gotenburgo



En mia (=Ingegerd) vestejo pendas ligna vestarko, kiu havas la surskribon "Pettersson & Katz", kaj subite la memoroj de mia infaneco ekas. Mi memoras ke mi opiniis ke "Katz" estas nobla nomo, kaj mi demandis kial ni ne povis havi tian noblan nomon. Tio estas "juda" oni respondis, sed oni parolis pri la vestoj, kiuj estis aĉetitaj tie. Estas kvazaŭ prestiĝo havi mantelon aŭ palton de "Pettersson & Katz". Eĉ mi mem havis mantelon de tiu loko.

Sed kiu do estis Katz. Nu, **Aron Katz** estis komercisto, naskita en 1877 en Pollando, verŝajne en la urbo Sidra.

En la jaro 1904 li edziĝis al Rebecka Feinstein, kiu estis sep jaroj pli juna. Ili translokiĝis en Bialystok.

Konekse kun la rus-japana milito en 1905 la antisemitismo disvastiĝis kaj je okazo Aron Katz estis grave perfortita kaj la familio decidis fuĝi. Estis Svedio por la familio de Aron Katz kaj fine li loĝiĝis en Gotenburgo, kie li fariĝis bona kaj publikutila civitano.

Mi ne povas ne demandi min ĉu Aron Katz iam kontaktiĝis kun Ludoviko Zamenhof. Certe Zamenhof havis 18 jarojn pli, sed tamen... la penso estas delikata.



”La Grandwitziro”

(la rubriko estas tipa gotenburga vortludo... pri veziro (svede ”visir”) = tipo de oficisto kaj la sveda vorto ”vits” = kalemburo)

Ĉu mi rajtas trofieri kaj prezenti **Aron Jonazon**, kiu, en 1887 sur la vaporŝipo Drott de la reĝo Oscar II mem, estis promociita fotografisto de la kortego. Vigla kaj amuza kalemburfaranto kaj volonte vidita festpartoprenanto en reĝaj kunligoj.

Li ofte estis gasto ĉe Oscar II, kaj en Linnégatan kaj sur la vaporŝipo Drott kaj ankaŭ en Marstrand.

Kaj certe oni povus imagi ke la spriteco leviĝu kaj ke ridoj kaj spritaĵoj rapide ”vaporu kun tia gasto”.

Multaj el la bildoj kaj portretoj de famuloj, fare de la ”grandwitziro”, troviĝas rete.



ARON JONASON



Ne nur la ”kremo” fotografigis sin ĉe la fotografejo de Jonazon. Sur mia vando pendas junaĝa portreto de mi mem kun hundo. Tiu portreto estis farita iam antaŭ la mezo de la 1990a jardeko, kiam la fotografejo ĉesis ekzisti. Erao iris tomben. Kaj nun estas tempo por la ”grandwitziro” fortiriĝi, antaŭ ol li fariĝu tielnomata ”Halanda vaporŝipo”. Tio aludas fojon, kiam Aron Jonazon faris tute ordinaran demandon kaj la tiama aŭskultanto ne komprenis – la kalemburon.

Pontus Fürstenberg – la granda artmecenato

Pontus Fürstenberg naskiĝis la 4an de februaro 1842 en Gotenburgo kaj fariĝis iom post iom grava kolektanto de arto, kiu tre gravas por la hodiaŭaj gotenburganoj kaj alvenintaj turistoj. Strange li ne estis aprobita kiel bofilo, sed la juna paro tamen renkontiĝis.



Estis Göthilda Magnus, kiu estis la dezirinda virino kaj ili decidis atendi pri la geedziĝo.

Kaj fine, la jaron 1879, la patro de Göthilda

mortas kaj ili geedziĝas la 31an de majo en 1880.

Post tio Pontus povis komenci sian artkolektadon kaj la apartamento en la Fürstenberga palaco estis ekipita per diversaj bildoj. Estis multaj junaj kaj talentaj gejunuloj, kiuj ricevis apogon de Fürstenberg. Ĉio eblis per la heritaĵo de Göthilda, tamen ne naskiĝis infanoj.



Sed kiuj estis la talentuloj? Nu, ekzemple Carl Larsson, Ernst Josephsson, Olof Sager-Nelson, Christian Eriksson, Anders Zorn kaj Per Ekström.

Nuntempe ni povas ĝoji ke la Gotenburga Artmuzeo ekpilis sian pli supran etaĝon per la kolekto de Pontus Fürstenberg. Mi certigas ke ĝi valoras viziton. La Nikso ludas tie...

Karl Warburg, la promociita profesoro je estetiko

Karl Warburg naskiĝis en Gotenburgo la 23an de novembro en 1852. Li estis tre bone edukita viro, kiam li komencis labori en la redakcio de Göteborgs Handels och Sjöfartstidning la jaron 1872, kie S A Hedlund estis la ĉefredaktoro. Karl Warberg estis spertulo pri literaturo kaj arthistorio. Pri tio li ĉefe laboris en la ĉiutaga gazeto.

Karl Warburg estis liberala kaj foje skribis politikajn artikolojn.



En 1890 li estis promociita profesoro je estetiko de la reĝa majesto.

Karl Warberg estis proksime al la gazet- kaj verkistomondo kaj estis brila kritikisto.

Li finis siajn tagojn en Stokholmo la 14an de septembro en 1890 kiel parlamentarano kaj membro de la urba deputitaro.

Sophie Elkan – naskita Salomon

Sophie Elkan estis eminenta verkistino, kiu tro facile troviĝis en la ombro de sia amikino Selma Lagerlöf. La romano de Sophie Elkan pri John Hall, la pli juna, en Gunnebo, meritis same grandan atenton kiel "Gösta Berling" de Selma Lagerlöf. Fakte, Sofie Elkan priskribas la malnovan Gotenburgon streĉe interese kaj celtrafe.



Ŝi naskiĝis la 3an de januaro en 1853 kaj havis renversan vivon kun grandaj privataj funebroj. Perdinte sian edzon Nathan kaj la dujaran filinon Kerstin en tuberkulozo, ŝi ĉiam vestis sin nigre.

En la jaro 1894 Sophie Elkan por la unua fojo renkontis Selma Lagerlöf kaj ili fariĝis tre bonaj amikinoj. Ili kune



vojaĝis al Italio, Egiptio, Palestino kaj al landoj en Eŭropo. Ili ankaŭ faris multajn vojaĝojn en Svedio.

Ĉar Otto Salomon estas la nevo de August Abrahamsson kaj kune kun tiu kreis sian slojdsminarion, sekvis ke lia fratino Sophie Elkan kune kun sia amikino Selma Lagerlöf

hazarde loĝis en la suda alo de Nääs dum multaj someroj.

Hodiaŭ oni faras diversajn kursojn en Nääs la semajnon antaŭ la somermezo. Mi mem partoprenis dum pluraj someroj. Mirinde! Pli pri Nääs estas skribita en Ora Ĵurnalo numero 19.

Mia sumigo



Mi tiel provis rerakonti kvin mirindajn judajn vivosortojn, kiuj indikas diligentajn homojn, kiuj kontribuis al la realigo de la socio, en kiu ni hodiaŭ vivas. El 50 delegitoj de la urba deputitaro, iam dek estis judoj. En la tuta gotenburga urbo troviĝas pruvoj ke agemaj judoj plibonigis la vivon dum longa tempo kaj tion ĉiu el ni ankaŭ faru!

Mi finas tiun mian priskribon de kelkaj mirindaj homoj per citaĵo de la epistolo al la galatoj en la Biblio, la 3a ĉapitro, verso 28:

*Ne estas ja Judo nek Greko,
ne estas sklavo nek liberulo,
ne estas ja vira kaj virina,
ĉar vi ĉiuj estas unu en Kristo Jesuo...*

/Ingegerd

Valdemar Langlet – forgesita heroo


estas la titolo de skribo de Agneta Emanuelsson, en 1999. Mi prenas el ŝia skribo:

Kiam la dua mondmilito eksplodis, Valdemar Langlet kaj lia edzino Nina ek de 1932 troviĝis en la ĉefurbo de Hungario. Li estis lektoro pri la sveda kaj ankaŭ deĵoris en la sveda ambasado.

Printempe en 1944 li estis elektita reprezentanton por la Sveda Ruĝa Kruco, ĉar la geedzoj jam startis ampleksan helplaboron inter persekutitaj judoj kaj aliaj minacitaj grupoj. La naziistoj transprenis la region la 19an de marto la saman jaron.

La 9an de julio Raoul Wallenberg venis. Li faris eminentan laboron, sed malaperis post relative mallonga tempo, la 17an de januaro en 1945.

La geedzoj Langlet restis ĝis la lasta ebla transporto okazis en majo 1945 tra Turkio. Ili venis al Gotenburgo la 2an de septembro post



senlaca savlaboro. Ili renkontis dankajn judajn geamikojn kaj la bofilinon de Waldemar, kiun ili ne antaŭe vidis.

En la skribo Agneta priskribas la ampleksan laboron de la paro, sed ŝi ankaŭ demandas sin: Kial la Sveda Ruĝa Kruco ne volis ricevi iliajn raportojn pri sia agado? Kopioj de ili hodiaŭ estas konservitaj en KB – la Reĝa Biblioteko en Stokholmo. Kaj kial oni honoras

Raoul Wallenberg, dum la geedzoj Langlet preskaŭ estas forgesitaj en Svedio – sed ne en Hungario? Multaj personoj atestas ilian agadon en Hungario.

Se vi konas Agneta Emanuelsson kontaktu ŝin por eble ekhavi ekzempleron de ŝia skribo. Se vi ne konas ŝin Ora Ĵurnalo helpas vin. Sed – la skribo troviĝas nur en la sveda. /Siv

La kanto de Leonard Cohen en la jida kaj esperante

de la kultura programo de la UK-102 en Seulo, 2017. Jen la teksto:

Davidida bela melodi'
Tre plaĉis al ĉiela Di'
Sed vi ne zorgas pri l'muzika bruo ja
Ĝi sonis tiel: bela tril'
Minora fal', maĵora bril'
Hezitas l'reĝ' kaj versas Haleluja
Haleluja, haleluja, haleluja, haleluja
Vi kredis firme, kaj venis l'pruv'
Ŝi banis sin en ora kuv'
Ŝia beleco ŝanĝis ĉion tuje
Ŝi lasis vin en iu kantin'
Kunprenis koron, konkeris vin
Kaj viaj lipoj flustris Haleluja!
Haleluja, haleluja, haleluja, haleluja

Mi estis, kara, ĉi tie jam
Min batis sort', min vundis am'
Mia anim' estis malplena ujo
Mi vidis vian flagon, sed
Amo ne estas nur l'posed'
Ĝi foje estas rompita Haleluja
Haleluja, haleluja, haleluja, haleluja
Antaŭe min informis vi
Pri viaj planoj, pri via viv'
Sed nun vi ja malgajas kaj enuas
Kaj mi memoras – nia kuniĝ'
Estis por ambaŭ ni feliĉ'
Ĉiu momento estis Haleluja!
Haleluja, haleluja, haleluja, haleluja.



Nataŝa kaj Ĵomart.

Jen la jida kun Daniel Kahn:

<https://www.youtube.com/watch?v=TJkGwM1pp-k>

Esperante kun Ĵomart kaj Nataŝa:

<https://www.youtube.com/watch?v=vzDkBK5hN0>


Esperante kun Manno Montanna:

<https://www.youtube.com/watch?v=W8WVKE80Zel>

Dum la fino de la UK en Lahtio 2019 la Internacia ĥoro kantis ĉi tiun kanton kiel saluton al la venonta UK en Kanada, de kie Leonard Cohen kiu kreis tiun kanton, venis.

Inga Johansson

Pete Seeger kantis en la jida



La tekstoj devenas de:

<http://www.familiaro.com>

Pete Seeger kantas "Dzhankoy" (en la jida):

<https://www.youtube.com/watch?v=UOW4L4X7j3U>

En ĉi tiu ligilo li parolas pri sia rilato al jidaj kantoj:

https://www.youtube.com/watch?v=TA7_nhH2o_I

Pete Seeger naskiĝis 1919 en Novjorko kaj mortis 2014. Lia patrino estis violonistino kaj instruistino, lia patro estis direktoro kaj muzika esploristo. Teorie la trako estis klara por muzika kariero. Jam en frua aĝo li montris sian eble plej eminentan trajton: la volo iri sian propran vojon. Anstataŭ muzikisto, li volis fariĝi artisto kaj ĵurnalisto. Sed kiam li aŭdis banĝon unuafoje, en 1936, li enamiĝis. En la sono, en la muziko, en la usona popola kanto.

Lia socia agado ne ĉiam plaĉis al registaroj sed liaj protestkantoj popularas ĝis hodiaŭ en la tuta mondo, precipe inter junularo. En la E-kulturo oni konas kelkajn.



Woody Guthrie (maldekstre) kaj Pete Seeger.

The Weavers & Gordon Jenkins Orchestra

Goodnight, Irene



Enirante la faman Harvard-universitaton, li daŭrigis sian muzikhobion.

Ĉesinte studi ĉe Harvard, Pete ankoraŭ ne sciis pri kio okupiĝi kaj do en somero 1938 li bicikladis tra la Atlantikaj subŝtatoj. Dumvoje li laboris de tempo al tempo en farmoj, nur por ricevi manĝaĵojn kaj dormi senpage. Intertempe li konatiĝis kun **Woody Guthrie**, la muzikanta vagulo kaj komponisto de kelkaj popularaj kantoj. Ambaŭ junuloj veturadis senpage, sur malfermitaj ŝarĝvagonoj. Ligitaj per komuna hobbio, la migranta duopo kantis en multaj lokoj, precipe por laboristoj.

Kiam finiĝis la milito, Seeger kunformis alian muzikgrupon "The Weavers" kies "Goodnight Irene" (Bonan nokton, Irena) – montriĝis tre sukcesa kanto, vendita je du milionoj da ekzempleroj.

Dum jardekoj Seeger komponis, kolektis kaj popularigis centojn de popolaj kantoj. La unua: "This land is your land".

Esperante "Jen nia mondo" kantis **Duo Espera** el Nederlando:
<https://www.youtube.com/watch?v=tl5FbwR-EB4>

Jen via mondo, jen nia mondo,
Kun monta neĝo kaj mara ondo,
De la tropikoj ĝis la polusoj.
Jen vasta mond' por ĉiuj ni.

(La tuta teksto ĉe: http://kantaro.ikso.net/jen_via_mondo)

Duo Espera kantis esperante la popularan kanton de Seeger –
"If I had a hammer" (Se mi havus martelon).



P. Seeger kun Kalifornia junularo.

La jardeko post 1950 ne favoris por kantado pri socia justeco, homrajtoj, ras-egaleco aŭ por kontraŭi militojn. Akuzita je simpatio al komunismo, Seeger devis aperi en juĝejo kaj rezulte li estis malpermesita disaŭdigi siajn kantojn en radio kaj televido.

Seeger ne nur estis fokusita je usona folkloro sed alprenis la muzikajn stilojn de Afriko kaj Latin-Ameriko. Al sia repertuaro li aldonis i.a. la plej faman kanton de Kubo – "Guantanamera":



Seeger vokita al juĝejo.

<https://www.youtube.com/watch?v=h0gg3-xvMB0>. Ĝi estas ankaŭ tre populara inter esperantistoj, precipe dum la junularaj kongresoj.

En unu vespero okazis popola dancado, dum kiu Pete konatiĝis kun bela knabino, japandevena Toshi Ota. Ŝi venis tien por fari filmon pri folkloro muziko.

S-ino Toshi Ota-Seeger.


Toshi tre plaĉis al Pete kaj post kelkaj jaroj li edzinigis ŝin. En unu intervjuo Pete konfesis ke lia privata vivo, profesia kariero kaj socia aktivado estis tiel sukcesa ĉar li povis ĉiam kalkuli je helpo de sia edzino.

Li estis konstante okupita pri muziko, tial Toshi devis mem okupiĝi pri iliaj tri infanoj kaj pri mastrumado en la domo.

Kune ili travivis 70 jarojn, ĝis kiam disigis ilin morto (Toshi mortis en julio 2013 kaj Pete ses monatojn poste).



La plurlingva biblioteko




Vendrede la 13an de septembro Ora Klubanoj kolektiĝis en la biblioteko de Gamlestaden, Gotenburgo.

La plurlingva biblioteko estis inaŭgurita la 1an de decembro en 2018.

Sur la dua etaĝo troviĝas libroj en multaj lingvoj – eĉ en esperanto. Ni sidiĝis en cirklo en komforta angulego. Lasse Granat laŭtlegis el "La knabo, kiu vivis kun strutoj" kaj Margareta Andersson tradukis en la svedan. Vendrede vespere ne estis multaj prunteprenantoj tie, krome estis ja vendrede la 13an – tago de misfortuno laŭ kelkaj – feliĉa tago laŭ aliaj. La nova biblioteko estas destinita por renkontoj kaj interparoloj trans etnaj limoj.





Raporto de Paulina, Pollando

pri tagoj kun sia edzo Janek ĉe la Balta Maro apud lago "Łebsko".

La vetero estis belega. En la tuta regiono kreskas multe da maljunaj kverkoj. Inter vilaĝoj kaj arbaroj etendiĝas pitoreskaj herbejoj. Kiel multe da fungoj ni vidis! Kiel multe da turoj ni grimpis!


Ni tranoktis en la ĉarma vilaĝo Kluki, kie estas tre interesa muzeo pri slava vilaĝo. Estas tie dekkelkaj "kradaj" domoj: iliaj "skeletoj" estis

faritaj el ligno, kaj poste la spacoj inter lignaj traboj estis plenigitaj de pajlo kaj argilo.

Ni ankaŭ ĝuis belajn kaj preskaŭ senhomajn strandojn kaj vagadis inter sablaj dunoj. Ni vere ripozis en tiu mallonga tempo. La vojaĝo ne estis longa, ĉar la lago Łebsko estas nur 2 horojn for de Gdańsk.

Mi sendas kelkajn fotojn. /Paulina

Dankon Paulina, ni vere bezonas memorojn pri la somero kiam nun la aŭtuno regas. /Siv



La KELI-kongreso en Hungario en aŭgusto 2019

Teksto de Agneta Järle, bildoj ĉefe de Margareta Andersson.



Vendrede 9 aŭgusto Margareta Andersson renkontis min ĉe la stacidomo en Gotenburgo.

Mi tranoktis ĉe ŝi, kaj je la 12a horo sabate nia aviadilo flugis de Landvetter.

Bengt-Olof Åradsson renkontis nin je la flughaveno en Budapeŝto kaj kondukis nin per sia aŭto al Révfülöp, ĉe la norda bordo de la Balatono-lago.

Balatono estas la plej granda lago en centra Eŭropo. Rév signifas haveno en la hungara kaj fulöp estis iu reĝo. La distanco inter Budapeŝto kaj Révfülöp estas 160 kilometrojn.

Nia blua loĝejo.

Nia kongresejo estis en la Evangelia templo Evangelikus kaj al la bordo nur estas ĉirkaŭ 250 metrojn.

Por iri al la banejo oni devas pagi 600 forintojn, ĉirkaŭ 20 svedajn kronojn.

Multaj homoj, kiuj loĝas en Budapeŝto, iras al Balatono dum ferioj kaj semajnfinoj.



Bano ĉe la lago Balatono.



Margareta en parko.



Panoramo sur Révfülöp.



La kastelo de Keszthelyr.

Ni estis ĉirkaŭ 25 kongresanoj el naŭ landoj.

La kongresa temo estis: "Mi estis fremdulo kaj vi gastigis min" el Mateo 25:35.

Nia programo tage estis la jena:

matenpreĝo, matenmanĝo, prelegoj, tagmanĝo, prelegoj, vespermanĝo, biblia rondo, diversaj programoj kaj vesperpreĝo.

La edzino de Bengt-Olof, Agnes Raczkevy-Eötvös, aranĝis la kongreson, kaj dimanĉe ŝi prelegis pri la situacio de rifuĝintoj en Hungario. Oni fermis la sudajn limojn efektive, kaj nur akceptas ke unu homo po tage eniru la landon.


En lundo persono de Helsinki-Komitato parolis pri ilia laboro, kiel ili helpas rifuĝintojn en Hungario.

Bengt-Olof prelegis tre interese pri "fake news", falsaj novaĵoj.

Marde ni faris tuttagon ekskurson al kastelo en la urbo Keszthely, je la okcidenta parto de la lago. Ni manĝis en restoracio kaj estis por la unua fojo ke mi manĝis malvarman abrikotan supon kun kremo kiel antaŭmanĝo!

Merkrede vespere venis muzikgrupo al nia kongresejo kaj ludis hungaran popolmuzikon. Estis tri gefratoj, kiuj ludis la violonon, la aldviolonon kaj la kontrabason. Ili estis tre lertaj kaj kantis kaj ludis samtempe.

Jaŭde estis la jarkunveno de KELI (Kristana Esperantista Ligo Internacia).



Muzikgrupo ludas popolmuzikon.



La estraro.

Dimanĉe kaj jaŭde vespere ni havis Diservon.



Ni atendas busekskurson.

Vendrede ni vojaĝis al la urbo Tapolca. Kiam oni en 1903 borserĉis por akvo, oni esploris kalkajn kavernojn kun akvo.



Agneta en grotoj.

De maldekstre: Hungara virino, Sieglinde Stamm el Aŭstrio, Agneta Järle kaj Margareta Andersson, Svedio kaj Bengt-Olof Åradsson kaj Agnes Raczkevy-Eötvös, plejtempe Hungario.

Mi estas kontenta pri la kongreso kaj gaja ke mi denove havis la eblecon renkonti geamikojn el diversaj landoj!

Agneta Järleström, Märsta



Filippe Cousson predikas.

Oni faris muzeon, kaj tie oni kun specialaj okulvitroj vidis filmojn, kiujn oni faris antaŭe ene de la kavernoj, tre bele kiel la naturo kreis dum longa tempo. Se oni malsupreniris ĉirkaŭ 75 paŝojn, oni povis promeni en la kavernoj kaj preni malgrandajn boatojn por pagaji inter la kavernoj.

Sabate ni fermis la kongreson kaj Bengt-Olof ŝoforis nin al la flughaveno.

Ni havis tempon viziti la domon de li kaj Agnes en antaŭvilaĝo de la ĉefurbo.

En la ĝardeno kreskas vinberoj kaj juglandarboj.



Esperanto-Sabato 7 septembro 2019

Sten Johansson rakontas pri sia ampleksa esperanto-verkado.



Mia verkado

Mi parolos pri mia Esperanta verkado, precipe pri tiu de la lastaj jaroj, sed mi komencos iomete prezenti min. Mi naskiĝis en esperantista hejmo; fakte miaj gepatroj ekkonis unu la alian en la loka Esperanto-klubo de Kalmar en sudorienta Svedio, kaj ili restis aktivaj esperantistoj ĝis sia morto. Do, jam kiel infano mi sciis, kio estas Esperanto, sed tio ne signifas ke mi parolis la lingvon. Tamen mi lernis kelkajn vortojn, kaj kiam miaj gepatroj havis esperantistajn gastojn vespere, mi kutime devis aperi antaŭ ili por kvazaŭ papage diri "Bonan nokton!" kaj poste enlitiĝi. Pro tio mi kelkfoje diras ke mi estas denaska bonan-nokton-esperantisto! Krome mi havis besteton en formo de flava ĉevaleto, kiun mi ricevis de franca amikino de miaj gepatroj, kaj ĝi nomiĝis Ĉevalo, sed mi fakte ne sciis, kion signifas tiu nomo.

Miaj gepatroj kelkfoje vojaĝis al Universalaj Kongresoj, lasinte la infanojn ĉe la geavoj, sed kiam mi estis dekkvinjara ili decidis venontjare vojaĝi al la UK en Budapeŝto kun mi kaj mia pli juna frato. Por ke tio ne estu tro enua, mi ekstudis lernolibrojn kaj rapide lernis Esperanton. Poste mi dum kelkaj jaroj

aktivis en la junulara movado. Interalie dum du jaroj mi estis redaktoro de la multobligita gazeto Kvinpinto. Sed la Esperanto-movado ne vere interesis min, kaj post kelkaj jaroj mi forlasis ĝin. Ĉar tiam la lingvo por mi estis tiel intime ligita al la movado, mi baldaŭ tute ĉesis uzi ĝin; do mi kabeis kaj restis kabea dum dek jaroj.

Kiel junulo mi havis multajn plum-amikojn, sed mi perdis la kontakton kun ili ĉiuj. Post dek jaroj mi tamen retrovis unu el ili kaj rekomencis korespondi kun li, kaj per tio mi fakte mal-kabeis. Baldaŭ li instigis min unue al tradukado de sveda literaturo, poste al propra verkado. Tiu amiko estas la brazilano Paulo Sérgio Viana, kiu mem talente verkas kaj tradukas. Do, fakte li estas la ĉefa kulpulo pri tio ke mi komencis verki en Esperanto.

Mi memoras ke en la komenco mi serĉis mallongajn noveletojn por traduki, ĉar mi ne havis forton por pli ampleksaj tekstoj, sed iom post iom la apetito kreskis dum la manĝado. Ankaŭ pri propra verkado mi komencis per noveloj, sed poste mi provis plej diversajn ĝenrojn. Mi verkis romaneton por infanoj, kvar krim-romanetojn, eĉ teatraĵojn kaj krome rakontojn en aparte

facila lingvaĵo, ĉar ekzistas bezono de tiaj. Lastatempe mi verkis precipe romanojn en psikologie realisma ĝenro. Mi verkis ankaŭ volumon kun literaturaj stil-pastiĉoj, do imitoj aŭ karikaturaj laŭ la stilo de 25 pli-malpli nuntempaj Esperantaj verkistoj, ilustritaj per karikaturoj desegnitaj fare de la ukraina desegnisto Niko Vološin. Tiu volumo estis inspirita de Specimene, simila verko de Henri Vatré el la 1950-aj jaroj. Plue mi verkis la libron Kroze – proze, kiu estas kolekto de literaturaj eseoj pri originalaj Esperantaj verkoj kaj verkistoj, kaj krome pri kelkaj teknikoj uzataj en verkado de rakonta prozo.

Mi diru ankaŭ ke mi kreis interretan retejon kun informoj pri originala beletro. Tio okazis iel senintence, ĉar origine mi volis nur fari kompletan liston de Esperantaj romanoj, sed la afero iom ŝvelis super la randojn. Tiu retejo nomiĝas OLE – Originala Literaturo Esperanta, kaj oni trovas ĝin ĉe la adreso esperanto.net/literaturo – do tre facile memorebla adreso. En ĝi aperas informoj pri verkistoj kaj verkoj, kaj la plej ampleksa materialo estas 1 700 recenzoj pri originalaj beletraĵoj. Sed iuloke en ĝi aperas ankaŭ ligoj al rete legeblaj tekstoj kaj eĉ tutaj libroj, ankaŭ kelkaj el miaj libroj, ekzemple la krimromanetoj. Do serĉu mian nomon en OLE, kaj vi trovos ilin.

Mi prezentos aparte miajn kvar lastajn romanojn. Antaŭ sufiĉe multaj jaroj mi kovis planon verki Esperantan romanon pri virino nomata Marina, kiu estu filino de esperantistoj. Sed pli ol tiom mi ne sciis; mi tute ne havis intrigon por ĝi. Malgraŭ tio mi provis ekverki, sed mi trovis nek bonan stilon nek intrigon, do tio iĝis aborta projekto, kiu kolektis polvon dum kelkaj jaroj.

Poste dum periodo, kiam mi verkis plejparte svedlingvajn novelojn, mi ekplanis transformi tiajn novelojn en romanon. Kiam mi komencis konsideri, kiujn novelojn mi povus uzi, mi trovis kelkajn, kaj baldaŭ mi sentis, ke unu aŭ du el ili povus fakte temi pri tiu imagita

Marina, kaj per tio ambaŭ projektoj kunfandiĝis, kaj mi kreis planon por Esperanta romano. Mi do transformis kelkajn novelojn aŭ partojn de noveloj en ĉapitrojn kaj poste verkis plu por krei tutan romanon. Ĝi aperis en 2013 ĉe Mondial en Novjorko sub la titolo Marina. Ĝi efektive havas du protagonistojn, Marina kaj Tomas, sed Marina estas la ĉefa. Tiu duopo havas tre malsamajn spertojn de familio, kaj la romano sekvas ilin epizode de la infanaĝo ĝis la mezaĝo. Kio precipe interesis min estas, kiel iliaj fruaj spertoj influas iliajn interrilatojn en la posta vivo.

Preskaŭ tuj post tiu mi ekverkis la sekvan romanon, kiu ricevis la titolon Skabio. Ĝi temas pri viro, kiu estas arestita pro ebla krimo, kaj dum unu tagnokto en la arestejo lia menso pli kaj pli konfuziĝas, dum li memoras epizodojn el sia vivo, precipe pri siaj interrilatoj kun aliaj homoj. Tiuj epizodoj, kiuj formas la ĉefparton de la romano, aperas en malkronologia ordo; do ni sekvas lin ekde la nuno retroire ĝis la infanaĝo. Tiu viro ne estas centprocente simpatia persono, kaj mi devas diri ke estas multe pli interese verki pri tia homo ol pri perfekte bonaj homoj. Tiu romano aperis en 2015.

Kiel mi jam diris, mi dum periodoj verkis multe da noveloj svedlingve. Bedaŭrinde la komercaj eldonejoj, al kiuj mi proponis ilin, ne interesiĝis, do mi mem eldonis ilin ĉe laŭmenda presejo. Proksimume en 2015 mi verkis svedlingvan romanon, sed ankaŭ tiu ne estis akceptita por eldono. Dum mi atendis respondon de eldonejo, mi komencis pretigi Esperantan version de tiu romano, kaj post sufiĉe multaj ŝanĝoj, ĝi fariĝis la romano El ombro de l' tempo, kiu aperis en 2017. Ankaŭ tiu romano temas pri kiel spertoj en unu tempo influas la vivon en multe pli posta tempo. Ĝi temas pri viro dum du tempoj: duono okazas en lia junaĝo en la 1970-aj jaroj, kiam li evoluas de adoleskulo ĝis juna plenkreskulo, la alia duono en la nuntempo.

Oni sekvas liajn interrilatojn familiajn, amajn, amorajn kaj amikajn en tiuj du epokoj.

En ligo kun tiu libro mi diru ion pri la rilato inter fikcio kaj realo. Fakte mi iam provis verki svedajn tekstetojn membiografiajn, sed ili fariĝis tute malinteresaj eĉ por mi mem. Do, anstataŭe mi ĉiam verkas pri fikciaj personoj en fikciaj intrigoj. Tamen mi uzas miajn proprajn spertojn, memorojn, problemojn, revojn ktp por trovi ian veran senton, kaj tiun senton mi klopodas planti aŭ inokuli en la fikciajn personojn kaj situaciojn. Krome mi kutime aldonas amason da realaj konkretaj detaloj pri lokoj kaj okazaĵoj, por ke ili kvazaŭ pruntedonu realismon kaj kredindon al la fikcia rakonto. En ĉi tiu romano mi faris tion en eble pli alta grado ol en aliaj, sed ĝiaj personoj kaj intrigo tamen estas same fikciaj kiel tiuj en miaj aliaj verkoj.

Kiam mi verkis la romanon Marina, mi enkondukis en ĝian finon kelkajn novajn cirkonstancojn de la protagonistoj, precipe de Marina. Tion mi faris simple ĉar mi trovis tion bona maniero fini la rakonton. Sed post kelkaj jaroj mi subite ekpensis, ke estus interese ekscii, kio okazis al ili poste. Nu, por ekscii tion, mi devis verki novan romanon, kaj tiu fariĝis Marina ĉe la limo, kiu aperis en 2018, ĉe Mondial, same kiel la aliaj. Tie ni

sekvas la samajn protagonistojn post naŭ ĝis dek jaroj. Tio signifas ke la rakonto okazas de julio 2016 ĝis decembro 2017, tio estas la sama tempo, kiam mi verkis ĝin. Mi ankaŭ metis en la fonon de ĝia intrigo kelkajn realajn okazaĵojn dise en la mondo. La ĉefa temo estas kiel kelkaj diversaj plenkreskuloj klopodas ĉiu en sia maniero trakti junan homon, kiu kondutas neakceptebla. Pli precize, mi igis la adoptitan filon de Marina, junulo dekseks- ĝis deksepjara, aliĝi al aro da novnazioj kaj partopreni en iliaj opinioj kaj agoj. Do, mi opinias ke ĉi tiu romano estas la plej nuntempa kaj aktuala el ĉiuj Esperantaj romanoj. Komprenoble, mi ne prezentas solvojn aŭ respondojn, kiel agi, sed nur klopodas esplori diversajn provojn. La intrigo de la romano enhavas ankaŭ aliajn aferojn, homajn interrilatojn ĝenerale, aliajn familiajn problemojn kaj tiel plu.

Mi finu, dirante ke lastatempe mi okupiĝas pri ankoraŭ unu Esperanta romano, kiu eble aperos en ĉi tiu aŭ la sekva jaro sub la titolo Ne eblas aplaŭdi unumane. Ĝi estos iomete pli leĝera ol la antaŭaj kaj traktos interalie kelkajn kulturajn diferencojn atendatajn kaj neatendatajn, kaj komprenoble homajn interrilatojn.



Kelkaj tagoj sur la okcidenta marbordo

Rememorigo al Sten Johansson pri la Gotenburga areo.



Por komforte vidi Gotenburgon ĉe la akvo, la kanala "tramo" Älvsnaven estas bona elekto kaj Jan Hellström estas sperta gvidanto.



Verkisto ja devas viziti la sinjordomon de Nääs kun la memoroj de Selma Lagerlöf, sed ni konstatis ke la turista sezono estis for. (La bildo estas malnova.)

Ni venigis Sten Johansson al Kungälv kaj Marstrand.



Sur la insulo Marstrand.



Salikokaj sandviĉoj estas devige sur Marstrand.



Ingerd kaj Sten rigardas la Societetshuset/la klubdomon kun la maro en la fono. En 1887 oni konstruis Societetshuset por la reĝo Oscar II, kaj ĝi ankoraŭ funkcias nun kiel bela restoracio.

Siv

Antaŭ 10 jaroj en la Gotenburga klubo okazis ekzemple

la Vendreda studgrupo 2009–2010.


Plej supre de maldekstre: Margareta Andersson, Ralf Jalming, Monica Eissing, Birgitta Anevik, Marianne Dahl, Francisco Prieto. Plej malsupre de maldekstre: Siv Burell, Irene Kumpulainen, Annelie Mononen, Britta Rehm, Ebbe Vilborg (gastpreleganto) kaj Aino Åberg.



Bedaŭrinde Ebbe Vilborg kaj Marianne Dahl ne plu vivas. Ni renkontiĝis en la ejo de Vuxenskolan, Karl Gustavsgatan 15, kaj uzis diversajn materialojn, i.a. "Etulaj aventuroj" de Zora Heide – se mi ĝuste memoras. /Siv

Ekskurso al la vitro-muzeo en Surte


(iomete norde de Gotenburgo) kun la Asocio de Aŭddifektuloj.



*Take one glass of Coca Cola
when weary with shopping
It imparts energy and vigor*

La bildo montras la fabrikon kiam ĝi produktis amason da vitraĵoj, ĉefe botelojn por eksporto. Jen la origina aspekto de kokakolao-botelo. La ŝnurvojo por krudaĵoj (sur la bildo) nun estas malkonstruita. La agado daŭris de 1862 ĝis 1978. La plej elstara produkto estis la botelo de kokakolao, desegnita de la elmigrinta svedo Alexander Samuelsson en Illinois.

La vendejo en Surte havis ĉion por la homoj kiuj loĝis en la areo.





Ankaŭ lernejo troviĝis, sed se mankis laboristoj pro iu kialo, oni ordonis al knaboj iri de la lernejo al la fabriko. Malmultekostaj laboristoj!!!


Virinoj nur tempe laboris en la fabriko. Edziĝinta virino prizorgis la luitan apartamenton, plej ofte nur unu ĉambron kaj kuirejon. La familioj estis grandaj kaj la loĝejoj ne tre bone izolitaj. Oni povis aŭdi siajn najbarojn. Ekz: Patrino riproĉas sian filinon, kiu forgesis aĉeti alumetojn. Baldaŭ najbaro frapas la pordon kaj ofertas al la patrino skatoleton de alumetoj por prunti.



Jen iama necesejo. Oni ofte legis revuojn sidanta sur la neceseja seĝo. Tiu knabo similas al Emil en Lönneberga, ĉu ne? Li legas "Tidsfördrif".



Jen fornoj en kiuj la temperaturo estis 1500 gradoj por la vitrosubstanco. Okazis ke vagabondoj troviĝis en tiu ejo, kiu vintre savis ilin de la ekstera malvarmo.



Korajn dankojn al la organizantoj, kiuj donis al ni interesan vojaĝon al malnovaj tempoj. /Siv

✪✪

Sveda ministrino salutis la kongreson en Lahtio en flua esperanto

Surpriza evento de la ferma ceremonio en la ĵus finiĝinta Universala kongreso estis la videa salutparolo en flua Esperanto de Amanda Lind, sveda ministrino pri kulturo kaj demokratio.

Jen la teksto de ŝia alparolo:

Saluton estimataj kongresanoj! Mi estas Amanda Lind, sveda ministrino pri kulturo, sporto, demokratio kaj naciaj minoritatoj. Kiel ano de Miljöpartiet, la sveda verda partio kaj de la tutmonda verda movado, la vivanta naturo kaj floranta kulturo estas valoroj tre proksimaj al mia koro.

Elkora bondeziron mi sendas al la Universala kongreso. Renkontiĝoj kaj babilado inter homoj estas fundamento por vigla demokrata evoluo.

Dankon al vi ĉiuj en la Esperanta movado pro viaj kontribuoj por instigi komunikadon trans lingvaj kaj naciajn limojn! Ni estu unu homaro sur ĉi unu terglobo.

Amike Amanda Lind.



Ĉu vi volus denove senti la finnan etoson?



Tiaokaze ĝuu "Sub la plena luno" (Täysikuu)! Kantas kaj muzikas: **Maria Kalaniemi** kaj **Eero Grundström**. La kanto estas en la sveda, sed Tuomi tradukis en esperanton.


Unue Tuomo Grundström skribis al mi (Siv) i.a: ...
"Apartan dankon al Sten pro la Gullberg-traduko. – Por reciproki, mi donu ĉi tie etan eron el la lando de tango kaj sopiro, kun mia traduko por Esperante kunkanti."

Ronda lun', miraklo pleja estas vi en noktĉiel'.
Ronda lun', la kosmon vestas via brilarĝenta bel'.
Vi vidas kiel amon trovas homoj sur la ter',
sed via sorto estas vagi sola en eter'.
Ronda lun', vi trovu kiun serĉas sopiranta kor'.
Ronda lun', vi mian kison portu al li en la for',
kaj flustru ke eterne mi lin amas kiel nun.
Ronda lun', mesaĝu tion, ronda lun'!
Ronda lun', vi trovu kiun serĉas sopiranta kor'.
Ronda lun', vi mian kison portu al li en la for',
kaj flustru ke eterne mi lin amas kiel nun.
Ronda lun', mesaĝu tion, ronda lun'!

<https://vimeo.com/2079082> /Siv

Preparo por la Libro-Foiro 26–29 septembro en Gotenburgo

kun la temo Sud-Koreio



Pasintan jaron SEF pagis por la ejo, la budo kaj parto de la informmaterialo, sed ĉifoje la Gotenburga klubo mem pagas kaj decidas pri la detaloj.

Dum kelkaj jaroj ni troviĝis sur la unua etaĝo ĉe Globala torget, sed nun ni estos ĉe Mångspråkstorget (La placo por plurlingveco) sur la baza etaĝo. Ĉar la budo ampleksas nur kvar kvadratajn metrojn ni metos kvar pendantajn librejojn (samas al tiu kun la urso) kun la titoloj: Lernolibroj, Por junaj homoj, Facile legeblaj kaj Nuntempaj libroj. Tablo kaj seĝo estos aldonitaj.

Unu el la ĉijaraj temoj estas Sud-Koreio. Ni, kiuj ĉeestis la UKn en Lahtio, provis kontaktiĝi kun koreaj personoj. Ni trovis kelkajn kaj petis ilin skribi artikoleon por Ora Ĵurnalo kaj sendi bildojn por la Libro Foiro, sed ankoraŭ ne venis io. Andreas aĉetis du librojn de KIM Onnuri, "Vojaĝo de Onia – Eŭropa" kaj "Vojaĝo de Onia – Japana". La unua, eldonita en julio 2014, temas pri ŝia vojaĝo en Eŭropo kaj en la dua de 2018 ŝi vojaĝas en Japanio. La verkistino mem faris la ilustraĵojn – tre ĉarmaj desegnoj.



La numero de la stando estas D04:16. Estu bonvenaj! /Siv

Mireille Grosjean – prezidanto de ILEI

kaj preleganto en la kvin mondpartoj



Mireille vere havas humuron. En sia blogo Mireille prezentas sin: "Aktivega kaj fortkaraktera emerito. Senbrutara nomado."

Ĉar unu el la temoj de la ĉijara Libro-Foiro estas Koreio, mi petis ŝin kontribuu al la bildo de Syd-Koreio. Pasintan someron la Universala Kongreso okazis en Seulo.

Jen ŝiaj bildoj kun komentoj:

SEULO, UNIVERSALA KONGRESO

22-an ĝis 29-a de julio 2017



Seulo, HANKUK universitato de fremdaj studoj. HUF.S.

Tie oni povas lerni pli ol 40 lingvojn kaj lertiĝi kiel interpretisto.


Panmunjom estas urbo sur la senarmila linio inter la du koreaj ŝtatoj. Por klopodi atingi tiun lokon, mi kontaktis jam en aprilo la svisan registaron en Berno, ĉefurbo de Svislando, grava indiko por ne svisaj legantoj. Mi obtenis



Tiuj ĉi paperetoj entenas mesaĝojn, kiuj esprimas deziron pri reunuiĝo de la duoninsulo.



inviton validan por mi kaj por tri Koreoj el la suda parto. Endas scii, ke svisaj soldatoj deĵoras en la senarmila zono ekde 1953 (fino de la korea milito) kun Svedoj en la Sudo. En la Nordo deĵoris Pollando kaj Ĉeĥoslovakio. Endas scii, ke ekzistas turismaj ekskursoj por iri tien, sed ke Sud-Koreoj devas obteni permeson ĉe sia registaro por aliĝi, kaj tio ne ofte okazas. Konsekvence miaj tri kolegoj estis tre kontentaj esti invititaj de la svislanda Delegacio.



Sabate 20an de septembro 2008, 9h15, veturilo de la NNSC (Neŭtral Nations Supervisory Commission) atendis nin en la perdita malgranda stacidomo Imjingang ĉirkaŭ 60 km norde de Seulo. Svisa kolonelo Albert Ulrich atendis nin ene. Vi vidas lin sur la foto. Li ĉion klarigis al ni, li donis al ni kafon aŭ teon, li faris prezenton pere de komputilo. Li ankaŭ respondis al ĉiuj niaj demandoj. Li kaj mi interparolis en la franca lingvo kaj mi tradukis al esperanto por miaj tri kunuloj. Oficiro sveda venis trovi lin kaj salutis nin.

Ni vidis Nord-Koreion

Mi verkos artikolon en la franca lingvo pri tiu vizito kaj tiu problemo, ĉar temas pri problemo. Mi verkos alian artikolon en Esperanto pri tiu vizito kunlabore kun Sinjoro Lee Jung Kee por la revuo "Monato". Tiu revuo koncernas la tutan mondon kun la jena

regulo: artikolo pri Peruo estas verkata de Peruano. Ĉar la senarmila zono inter la du koreaj ŝtatoj povas esti konsiderata kiel parteto de Svislando, mi verkos kunlabore kun mia korea kolego. Kaze ke vi deziras ĝin, bv ekrikti kun mi tiusence. Junio 2010.

Junio 2010

Mi prelegas en KoToPo en Lyon, Francio. Per la helpo de svisa ĝenerala konsulo venas al la prelego eksgeneralo svisa, kiu deĵoris dum kelkaj jaroj en Panmunjom. Mi sciis pri lia alveno kaj iom ektimis, ĉar mi estis en Panmunjom nur du horojn... do certe li scias pri la historio de tiu loko multe pli bone ol mi.

Li tre afable lasas min prelegi kaj poste mi petas lin komenti. Li jene komentis pri la eventoj de 1991:

En tiu jaro la NNSC evoluis. Fako estas, ke Ĉeĥoslovakio kaj Pollando, kiuj observis la limon en Norda Koreio, fariĝis demokratioj. Plie Ĉeĥoslovakio disiĝis kaj naskiĝis Ĉeĥa Respubliko kaj Slovakio. Tia demokratiigo ne povis konveni al Norda Koreio.

Norda Koreio postulis foriron de tiuj du taĉmentoj. La soldatoj respondis, ke ili obeas nur al sia registaro, kaj restis. Norda Koreio montris la kontrakton kun Ĉeĥoslovakio kaj argumentis: vi ne estas ĉeĥoslovakoj, vi devas foriri. Ĉeĥoj devis foriri. Restis poloj. Norda Koreio fermis la liveradon de elektro kaj akvo. Konsekvence la svisoj kaj svedoj el la sudo liveris akvon kaj manĝaĵojn por poloj en la nordo. Post tri monatoj la situacio estis neeltenebla kaj poloj devis foriri. Nun ili revenas tra la sudo por saluti siajn kolegojn.

Laŭ tio oni komprenas, ke la forto de la NNSC malkreskis pro tio duonigo de siaj fortoj en tiu tikla loko. Neniu observas la limon en la nordo. En la sudo estas daŭre Svislando kaj Svedio.

Jen la prelego de Mireille Grosjean okaze de la Pont-Kunveno en la Parlamento en Seulo la 28-an de julio 2018.

« Kiam elefantoj luktas, herbejo suferas. »

Tio estas afrika proverbo. Tiu frazo validas ie en la mondo. Tio plej trafte priskribas la suferojn de la korea popolo. Estas fakto, ke Koreio estas loko, kie la diversaj mondaj

potencoj eble ne luktas momente, sed staras proksime, eĉ vidalvide en Panmunjom, kaj asertas sian forton. Do la tutmonda geopolitiko ludas sian teatron sur la orientazia duoninsulo. Sen ia konsidero pri la opinio kaj sentoj de la popolo.

Je la fino de la korea milito en 1953 la vartado de la fronta limo estis transprenita de Unuiĝintaj Nacioj UN. UN arigis kvar neŭtralajn ŝtatojn por stari ĉe la limo kaj observi la eventojn tie. En la nordo alvenis soldatoj el Pollando kaj Ĉeĥoslovakio, en la sudo Svedio kaj Svislando. Ilia tasko estas observi kaj raporti al UN en Novjorko.

En 1990 okazis politika evoluo en Eŭropo. Pollando kaj Ĉeĥoslovakio fariĝis demokratioj. Tio ne povis plaĉi al la komunisma registaro en Norda Koreio. Do la nordkorea registaro provis forpuŝi tiujn du taĉmentojn. Mi malkaŝas tiujn eventojn al vi hodiaŭ, mi aŭdis pri ili rekte de svisa eksgeneralo, kiu deĵoris en Panmunjom nome de UN. Tamen tiuj soldatoj ĉu polaj ĉu ĉeĥoslovakaj ne sekvis la postulojn asertante, ke ili obeas al sia propra registaro. Plie Ĉeĥoslovakio ne plu ekzistis, ĉar tiu Ŝtato disiĝis al du Ŝtatoj. Do la nordkorea registaro devis trovi alian strategion. Ĝi sukcese argumentis ĉe la ĉeĥoj: « ni subskribis kontrakton kun ĉeĥoslovakoj, vi estas ĉeĥoj, do vi havas nenion por fari ĉi tie ». Tio sukcesis, ĉeĥoj devis foriri. Restis poloj. La nordkorea registaro decidis ne plu liveri akvon kaj elektron al la loĝdomoj de tiu taĉmento. Dum kelkaj semajnoj svisoj kaj poloj liveris akvon, legomojn, diversajn manĝaĵojn al la poloj en la nordo. Tamen la situacio fariĝis ne eltenebla kaj poloj devis foriri.

Nun plu deĵoras en la sudo svisoj kaj svedoj. Mi povis viziti la svisan taĉmenton en 2008 okaze de mia prelegturneo en Suda Koreio. En 1953 Svislando metis je dispono 140 soldatojn. En 2008 kaj nun ili estas kvin. Interesa fakto estas, ke en 1953 Svislando ne

estis membro de UN. Per tutpopola baloto Svislando fariĝis membro de UN en 2002. Do la laboro de Svislando en Panmunjom estas libervola kontribuo al monda kaj loka paco.


Mi estis tre kortuŝita, kiam mi atingis la stacidomon de Imjingang, antaŭ ol esti gasto ĉe la svisa taĉmento en Panmumjom. En tiu stacidomo estas muro kun multaj paperetoj

metitaj de tristaj aŭ koleraj koreoj: ni volas reunuiĝon. Mi arde deziras, ke paca solvo estu trovita por reunuiĝo de la duoninsulo. Mi ne povas paroli nome de la svisa registaro, ĉar mi estas simpla civitano; sed mi certas, ke kaze de bezono Svislando ĉiam pretas esti peranto en tiaj situacioj.

Mireille Grosjean, Svislando

Bo Sandelin legis interesan libron dediĉita al Ulrich Lins, plej konata pri sia libro "La danĝera lingvo"

Titolo	En la mondon venis nova lingvo Festlibro por la 75-jariĝo de Ulrich Lins
Kategorio	Eseoj
Prezo	39.00 €, sesona rabato ekde 3 ekz.
Eldonloko, jaro	Novjorko, 2018
Eldoninto	Mondial
Klarigoj	Pli ol tridek kontribuajtoj dividitaj en kvar partojn: La suspektinda lingvo, Vivo kaj ago de esperantistoj, Spuroj el historiaj procezoj, Ideoj kaj praktikoj pri Esperanto kaj aliaj interlingvoj.
Kontribuantoj	Redaktis Gotoo Hitosi, José Antonio Vergara, Kimura Goro Christoph
ISBN/ISSN	9781595693785
Formato	700 paĝoj, 23 cm
Karakterizoj	Bind. Kromkovrilo
Recenzoj	ĵus skribita de Bo Sandelin



Festlibro por Ulrich Lins

Ulrich Lins estas unu el la plej renomaj esperantistoj, precipe pro siaj historiaj studoj pri la sorto de Esperanto sub la naziisma kaj stalinisma reĝimoj. En 2018 li fariĝis 75-jara kaj estis celebrata per En la mondon venis nova lingvo: Festlibro por la 75-jariĝo de

Ulrich Lins, redaktita de Gotoo Hitosi, José Antonio Vergara kaj Kimura Goro Christoph kaj eldonita de Mondial (2018).

La libro enhavas 31 ĉapitrojn de same multaj aŭtoroj, plus enkondukon kaj la bibliografion de Lins. La ĉapitroj estas grupigitaj en kvar partoj, el kiuj la unua titoliĝas *La suspektinda*

lingvo, la dua *Vivo kaj ago de esperantistoj*, la tria *Spuroj el historiaj procezoj* kaj la kvara *Ideoj kaj praktikoj pri esperanto kaj aliaj interlingvoj*. La kontribuaĵoj estas tre malsimilaj teme, lingve kaj kvalite. Mi atentis nur kelkajn erojn, kiuj precipe interesis min.

Renato Corsetti montras ke efika malhelpo al Esperanto okazis komence de la 1920-aj jaroj, kvankam favora raporto kun rekomendo pri instruado de esperanto estis traktata en la Ligo de Nacioj. Forta opozicio venis de Francio, kies delegito argumentis ke "jam ekzistas internacia lingvo: la franca, universale instruata ĉie en la mondo de la penso" (p. 24). Poste la internacia signifo de la angla kreskis je la kosto de la franca. Ekonomiaj kaj politikaj realaĵoj verŝajne estis la fundamentaj kaŭzoj, sed Corsetti faras tre interesan prezenton de la projekto Basic English kaj de la sinteno pri la rolo de la angla lingvo de la brita politika gvidantaro. Churchill diris en fama parolado ke li "ne vidas kial ni ne devus provi disvastigi nian komunan [t.e. anglan] lingvon eĉ pli vaste tra la mondo" (p. 27).

Ĉapitron de Nikola Raŝić, "Ĉu vere danĝera lingvo – Ulrich Lins kaj la historio de la futuro", mi atentis ĉefe pro ĝia lingvaĵo. Interalie ŝajnas ke Raŝić amas konstrui verbojn sed provas eviti la vorton estas. Ekzemple senas, prias, unikis, viktimis, multis, lernendis, unualokas, ilas, lingvi, prais kaj poras ja estas tute eblaj esperantovortoj, sed ne tre kutimaj. Raŝić montras la flekseblecon kaj esprimopovon de esperanto, sed uzante multajn nekutimajn vortformojn kaj esprimojn li kelkfoje devigas la leganton pene deĉifri la tekston. Tio malhelpas fluan legadon. (Simile So Gilso en ĉapitro pri la azia movado malhelpas fluan legadon komencante novajn frazojn per minusklo.) Raŝić certe konsciis sian lingvan provokon, ĉar en piednoto li argumentas: "Kelkfoje indas aŭdaci testi la limojn kaj propran lingvan senton. Esperanto estas ankaŭ

memesplorilo, kiu defias kaj la uzanton kaj sin mem. Danĝera idiomo!" (p. 38).

Enhavante mi notas ke Raŝić vidas pli fortan apogon por esperanto en la fruaj 1900-aj jaroj: "El la periodo komence de la 20-jarcento kaj la intermilita periodo, oni povas citi longan liston de Nobelpremiitoj, gravaj sciencistoj, ŝtatestroj kaj aliaj eminentuloj kiuj parolis aŭ subtenis Esperanton kaj Idon" (p. 55).

Tre interesa ĉapitro de Thomas Bormann temas pri la rilatoj inter la esperantistoj kaj Stasi, t.e. la ŝtata sekreta servo en la iama GDR (Germana Demokratia Respubliko). Stasi volus "scii ĉion" laŭ sia estro. La nun malfermitaj arkivoj montras ke inter la esperantistoj troviĝis kaj raportantoj kaj raportatoj. Kvankam Bormann indulgeme ne mencias la verajn nomojn de raportantoj, iufoje li donas tiom da detaloj ke oni apenaŭ dubas pri kiu temas.

Prezentinte plurajn kazojn de la agado de Stasi, Bormann resumas: "Regule Stasi kontrolis kaj observis esperantistojn, regule Stasi venis al la konkludo, ke la esperantistoj ne signifas danĝeron por la sekureco de la ŝtato GDR. Tamen Stasi ĉiam denove lanĉis novajn observadojn de esperantistoj – laŭ la doktrino de Stasi, ke la sekreta servo 'devas scii ĉion'" (p. 144).

Ulrich Lins ja verkis multe pri la malfeliĉa sorto de esperanto en Sovetunio dum la tempo de Stalin. En la festlibro Vladimir Samodaj priskribas la postan periodon ekde la reorganizo de la esperantomovado en 1956 ĝis la starigo de Rusia Esperantista Unio en 1991. Kvankam esperantistoj dum tiu periodo ne plu estis persekutataj, ŝtata enmiksiĝo kaj kontrolado de la agado daŭre okazadis.

La nomon de Silvio Gesell (1862-1930) mi antaŭe renkontis en la historio de ekonomiko. Li estis heterodoksa ekonomikisto, kiun iom atentis la pli fama

John Maynard Keynes. Mi ne sciis ke Gesell interesiĝis pri esperanto, sed tion priskribas Javier Alcalde en la ĉapitro "Tri Esperantaj projektoj de Silvio Gesell". En la 18-voluma kompleta verkaro de Gesell "ekzistas almenaŭ 15 referencoj al la lingvo iniciatita de Zamenhof" (p. 375).

La unua el la tri projektoj, kie esperanto povus ludi rolon, rilatas al pacaj celoj post la unua mondmilito, la dua temas pri lingvo en europa unio kaj la tria pri oficiala lingvo de Supra Silezio, kie la loĝantaro estis lingve heterogena.

La rusa verkisto Leo Tolstoj estas ofte menciata inter famuloj, kiuj apogis

esperanton. Leif Nordenstorm pritraktas lian signifon en la ĉapitro "Leo Tolstoj kaj lia influo al la idearo de Esperanta komunumo". Precipe li prilumas la ligan inter la Monta prediko, kiu estis esenca por Tolstoj, kaj la humanismaj ideoj ĉirkaŭ esperanto.

Mi nun donis nur kelkajn ekzemplojn el la enhance riĉa festlibro. Ĝia vasta kaj varia temaro ebligas al ĉiu trovi ion interesan. Legante en ĝi oni komforte sidu en brakseĝo aŭ ĉe skribotablo, ĉar la 700-paĝa libro estas iom tro peza por ĝui kuŝante en la lito.


Bo Sandelin

Marina du-oble-du... jen nia verkisto Sten Johansson

Sten Johansson diras ke post la unua Marina li devis skribi la duan por ekscii kion okazas al la roluloj – preskaŭ vivantaj. Oni ne devas legi la unuan "Marina" antaŭ ol komenci pri la dua – Marina ĉe la limo.

En la Libro-Foiro ni ĝojas ke ni povos montri ankaŭ novskribitajn librojn. Marina ĉe la limo datas de 2018 kaj okazas ĉe la fono de aktualaĵo, ekz. la pafado de naziaj grupoj en Malmö. Junuloj ŝatas la norvegan televidan serion Honto (Skam). La radioprogramo Sommar ankaŭ estas populara.

Mi ankaŭ trovis vortojn, kiujn mi ne facile trovis en vortaroj... novkreitajn.



SVEDE

iQ
kvot
förberedelseklass
tugga om (en fras)
blogg
öгна i
attentat
nysta upp tråden
jihadister
zappa mellan kanalerna
åklagare
försvarsadvokat

ESPERANTE

ikuo
kvociento
enkonduka klaso
gurdi
blogo
fluglegi
atenco
bobeni la fadenon
ĝihadistoj
zapi tra la kanalaro
prokuroro
defendisto

dyster
hängslen
burgare
falafel
smältdegel
gaskammare
app
mysig
googla
solarium
blåtand
internat
stryka mothårs

morna
ŝelkoj
burgero
falaflo
mikspoto
gaskamero
apo
mojosa
gugli
sunumejo
Bludento
internulejo
kuspi la hararon

(grav)hög	tumulo
snabbmat	rapidvoraĵo
häleri	ricelo
banderoll	slogantuko
slagord	frapfrazo
nämndeman	laika juĝanto
SMS	tekstmesaĝo



vittne	atestanto
övervakningskamera	gvatkamerao
försvarare	defendisto
dom	verdikto
villkorlig dom	kondiĉita prokrasto de verdikto

La lastaj vortoj indikas ke i.a. temas pri krimo. Jes, sed la knabo nur estis 16-jara kiam li partoprenis en naziista benzinatako kontraŭ la hejmo de ĵurnalisto.

La recenzo sur la malantaŭa kovrilo de la libro estas tiel bona ke mi ne klopodu fari ion.

Mi nur vivas kun la libraj roluloj! Dankon Sten, pro moderna libro kun ĉiutagaj problemoj kaj ankaŭ interesaj priskriboj de la naturo en Skanio kaj en Jemtlando.

Mi cerbumas... ĉu Tomas estas la alter ego de Sten?
/Siv



Plupo kaj la Gruoj en Esperanto

(La Plena Sonlibro) – sugesto de Inga Johansson

Alekso MILLER voĉlegas la plenan tekston de la libro Plupo kaj la Gruoj, unue eldonita de la Progreso-Eldonejo en 1986.

La origina titolo de ĉi tiu libro estas "Plupp och tranorna" kaj estis origine verkita en la sveda.

Eniru:

https://www.youtube.com/watch?v=aVtjQ3V_gWg

Vi kaj aŭdas la voĉon de Alekso Miller kaj povas legi la tekston samtempe.

Gufo en centra parto de Gotenburgo, GP raportas



La pasintan semajnon oni trovis gufon sur balkono en Vasastan. Ĝi allogis multajn scivolemajn homojn al la ejo. La gufo ne ŝajnis timi la multajn spektantojn.

La bestambulanco provis kapti ĝin, sed malsukcesis. La venontan tagon oni povis kapti ĝin kaj transporti ĝin al la Birdocentrejo por esplorado. Oni ja supozis ke ĝi estas malsana pro ĝia stranga konduto.

Tommy Järås en la Birdocentrejo diris al G.P:
"Ĝi verŝajne havis baton de aŭto. La vosto

estas nestabila kaj ne taŭgas por stiri. Verŝajne ĝi havas specon de vundo je la spina medolo.

Cetere ĝi estas vigla, sed malgrasa. La flugiloj estas en ordo".

Bedaŭrinde oni ne povis sanigi ĝin. Ĝi mortis la venontan tagon.

De artikolo de Ulrika Karlsson
ulrika.karlsson@gp.se /Siv

La kamphirundo

Latina nomo: Hirundo rustica. Renate Säfström fotis.

Tiu ĉi birdo estas la plej kutima hirundo en Svedio.

En la bildo, fotita de Renate, ni povas vidi birdon kun tre bonaj koloroj.

La kamphirundoj estas tre belaj kaj amuzaj kaj troviĝas ekde "Torne"-sama lando al suda Svedio. Ĝi manĝas insektojn kiuj estas kaptitaj en la aero. La birdo kantas "vitt vitt" kaj ripetas tiun kanton ofte, ofte... La pepado aŭdiĝas ĉirkaŭ homaj konstruaĵoj. Mi mem havas ofte kamphirundojn en mia brutejo Enerkullsdalen. Ili flugas kaj pepadas dum la tuta somero. /Ingegerd



Stefan konstruas tankon

Nia aŭto malsukcesis ĉe la jara inspektado. Trovasteco en la suspensia aranĝo por malantaŭa rado kaj antaŭlumo kun preskaŭ netrasidebla vitro. Do, mi telefonas Stefanon. "Venu vendredon," li diras.

Li povas ripari ĉion je aŭtoj, ĉion, de la plej malgranda parto en motoro ĝis difektoj je la karoseriaj platoj. Se estas facile aĉeti damaĝitan parton, li faros tion, alie li fabrikos ĝin mem! Li tornas, glatigas, fleksas, boras, kanelas kaj veldas ĝis li havos la mankantan parton. Li havas grandegajn stokojn de ladplatoj, boltoj, tuboj, jes ĉio.




Estas kompleta ordo en lia laborejo. Ĉiuj iloj kaj materialoj en siaj lokoj. Sur la plej altaj bretoj estas kelkaj pli-malpli antikvaj radioaparatoj kaj sur la muroj estas fotoj kaj belaj (por la teknike interesitaj) maŝinpartoj.

En alia ĉambro staras iama germana militista ĵipo, antaŭ nelonge vera aŭtovrako, kie ĉiuj korpompartoj kaj maŝinaj partoj, kiuj tiam mankis, anstataŭiĝis per novaj, tiel ke ĝi pretas por inspektado.



En malantaŭa ĉambro estas granda vitra muro. Malantaŭ ĉi tiu estas kelkaj modelaj konstruaĵoj de militaj veturiloj, plej multaj tankoj, skrupulege faritaj (je la ekstero) kiel iliaj rolmodeloj.

Tamen la plej stranga tanko-konstruaĵo estas en la garaĝo, ĝi estos grandskala tanko! Motoro teknike kompleta, kontroloj kaj vidaĵoj (lanternoj, ĉeflanternoj, ĝirindikiloj kaj periskopoj), kaj krom tio, imitaĵojn por mitraloj kaj kanono.



Stefan, kiam infano, komencis interesiĝi pri veturila tekniko kaj, post kompletigado de veturil-inĝenieria lernejo, devis fari militservon en tankaĉmento, estis en Hungario dum la soveta epoko. Tie kaj tiam la militservo daŭris plurajn jarojn, tial li lernis ĉion pri veturado kaj riparado de tankoj kaj aŭtoj.

Dum la soveta epoko, la infrastrukturo en Hungario estis severe neglektita kaj la militistaro ofte petitiĝis helpi

multajn aferojn. Unu el la pli mirindaj okazoj estis kiam virino vivanta alte en alpa monta regiono naskos infanon. Grandega neĝoŝtormo kripligis ĉiujn kutimajn transportojn, sed la tanko de Stefan povis realigi ĝin. La virino zorgeme helpiĝis malsupren en la malvasta municitenejo kaj verŝajne ekhavis skuitan sed memorindan vojaĝon malsupren laŭ la monto al la hospitalo. Ĉio iris bone, ŝi poste sendis varman dankan noton al siaj savintoj.



“Se via vilaĝo ĉi tie en Svedio estus izolita pro neĝo, ĉu vi povus helpi?” mi demandis al Stefan.

“Jes, parte ĉar mi povas atingi ĉien ajn kaj krome ke mi havas fiksilojn ĉe la fronto, kien mi povas surmeti plugilon. Se estas mallume kaj neĝokirlado, mi tamen povas vidi per la infraruĝaj periskopoj!”

“Kiam ĉi tiu projekto estos kompleta, ĉu vi havas ion novan en menso?”

“Ho jes, mi ĉiam havas ion. La plej proksima afero estas konstrui malgrandan dusidan aŭton por mia nepino. Tipinspektita kaj registrita!”

Lasse Granat

Doris Day

– la fama ĵaz- kaj popkantistino de Ameriko

Doris Day naskiĝis la 3-an de aprilo en 1922 kaj komencis sian karieron kiel dancistino. Kaŭze de trafikakcidento ŝi ŝanĝis la karieron kaj komencis kanti kun grandaj jazbandoj.

La listo de kanzonoj estis longa, ekz. *Tea for two*, *Lullaby of Broadway*, *Sentimental journey*, *Que sera sera* ktp. Ŝi ankaŭ faris filmojn ekz. *La viro kiu sciis tro multe*, *Teo por du*, *La sovaĝa filino el Okcidento* ktp. En kelkaj filmoj ŝi ludis kontraŭ la fama Rock Hudson.

Dum la jaroj 1968–1973 “The Doris Day show”, komedia programo, estis montrita en televidkanalo CBS.

En la jaro 2004 ŝi ricevis “La Liberan Medalon”. Ĝi estas la plej distingita kaj civila honorinsigno de Usono kaj estis donita de George W Bush.

La 13-an de majo 2019 silentis la bona kanto de Doris Day sed estos eble aŭdi per YouTube “Que sera sera, what ever will be, will be.”

<https://www.youtube.com/watch?v=MacGLfiNmwY>



Al la patrin' demandis mi

QUE SERA, SERA • WHATEVER WILL BE, WILL BE



1. Al la pa-trin' de-man-dis mi: «Ki-el mi
2. Al la ka-rul' de-man-dis mi: «Ki-a ĝi
3. Nun mi-a fil' de-man-das min: «Ki-el mi
4. Kaj en la hor' de mi - a mort' mi min de-




vi - vos en la es - tont'? — Ĉu en be - le - co
 es - tos, ni - a es - tont'? — Ĉu ĉi - el - ar - ke
 vi - vos en la es - tont'? — Ĉu ad - mi - ri - te
 man - dos: «Ki - a la sort'? — Ĉu por e - ter - ne



kaj en ri - ĉec'?» Ŝi - a res - pond' al mi:
 ta - gon post tag'?» Dol - ĉe res - pon - dis li:
 kaj en fe - liĉ'?» Mi kun te - ner' al li:
 for aŭ en glor'?» Jen la kon - so - la vort':



«Que se - ra, se - ra. What - e - ver will



be, will be. 1-3. Ka - ŝi - tas la ont' al ni.
 4. Sed ko - nas la on - ton Di'.



Que se - ra, se - ra. What will be, will be.»
 Kaj Li a - mas vin per e - ter - na am', ▶



▶ per e - ter - na am'.»

La Tago de Samarkando 2019... admono de Anatolij Ionesov uzi la Internaciajn Letertagojn por skribi al "Samarkandiana"



LA INTERNACIAJ LETERTAGOJ – 2019

"VORTO PRI SAMARKANDO: LA URBO PRI KIU ONI ŜATAS PENSI, SONGĜI KAJ PAROLI"

Karaj amikoj, kolegoj, samideanoj,

Baldaŭ denove venos la signifoplena dato kaj festa okazaĵo por la urbo, pri kiu multaj loĝantoj de nia planedo ŝatas pensi, memori, revii kaj paroli. La 18-a de oktobro – la Tago de Samarkando. La evento celas refokusigi nian rigardon je alloga belo, unika aromo kaj arkitektura dekoro de la urbo. Tradicie, estas invitataj kontribui ĉiuj, por kiuj Samarkando estas pli ol nura urbo. Por kiuj ĝi estas vivanta memoro, emociplena historio, signifa malkovro, amdeklaro, rendevuejo kaj eĉ sorto. Ĉiuj, kiuj persone spertis la mirindaĵojn de Samarkando en realo, ĉu de malproksime, ĉu estinte tuj apude aŭ eĉ nur en siaj pensoj aŭ songoj, konservis neforviŝeblajn impresojn pri la grandioza historia heredaĵo kaj neordinara nuntempa kulturo de la mondfama urbo.

Kaj ĉiujare venas la Tago, kiam ni esperas, ke almenaŭ por momento, vi transformos viajn pensojn kaj sentojn en ion kreivan por el la fundo de via animo esprimi – naskitajn fare

de via koro kaj enstampiĝintajn en via menso – rememorojn pri tiu ĉi speciala loko.

Tio estas eblo por dividi viajn travivaĵojn kaj sentojn, por konigi viajn specialajn spertojn kaj tra tiu ĉi transdono denove fari Samarkandon rendevuejo por homoj kaj kulturoj, tradicioj kaj novigoj, por Oriento kaj Okcidento, Sudo kaj Nordo. Ja ĉiam tiel estis en la pasinteco kaj estu tiel ankaŭ en la estonteco!

Eble por iuj, ununura vorto sufiĉos por esprimi tiun ĉi vizion; iuj skribos personan leteron al Samarkando aŭ verkos saluton forme de poemo, kanto, desegnaĵo; aŭ komunikos siajn bondezirojn aŭ songojn por la estonteco de la urbo... Kompreneble, ĉio dirota kaj verkota pliproksimigos nin unu al la alia, unuigos nin ĉirkaŭ la eternaj valoroj, pliigos niajn konojn, evoluigos spertojn, plifortigos pacon kaj harmonion – ĉion, kio ebligis al Samarkando atingi la majestecon kaj por ĉiam eniri la historion.

Bonvolu sendi viajn reeĥojn, gratulmesaĝojn kaj alispecajn tiutemajn kontribuojn, laŭeble, ĝis la 1- de oktobro 2019 al imps86@yahoo.com, kvankam la materialoj iutempe estos akceptataj ankaŭ post tiu ĉi dato.

La plej interesaj kontribuaĵoj estos publikigitaj en nialanda gazetaro kaj en la venonta eldono de "Konciza Enciklopedio de Eksterlanda Samarkandiana: Kulturo Unuiganta la Mondon".

ĈIU ricevita mesaĝo estos danke agnoskita kaj la raporto pri la evento estos sendita al ĈIUJ partoprenantoj.

Atendante vian baldaŭan reeĥon, ni antaŭdankas pro viaj asisto kaj eventuala kunlaboro.

Amikajn bondezirojn el 2760-jara Samarkando, la urbo de Monda Heredaĵo de Unesko,

Anatolij Ionesov
Enciklopedia projekto "Samarkandiana"
P.O. Box 76, UZ-140100 Samarkando
Uzbekio

Retpoŝto: imps86@yahoo.com

P.S. Bonvolu, se eble, plusendi tiun ĉi anoncmesaĝon al viaj amikoj, konatoj ktp.

Esperanto-Kulturdomo en Grésillon informas



Saluton,

Ni kore invitas vin al:

A) kursaro-staĝo AŬTUNE, de sabato 26a de oktobro ĝis dimanĉo 3a de novembro en la fama franca Esperanto-kastelo Greziljono kun programo tro riĉa por povi noti ĉion ĉi-tie. Por nia staĝo AŬTUNE ni serĉas kelkajn novajn aktivaĵojn kaj prelegojn por la infanoj kaj eks-infanoj. Ĉu vi estos unu el la novaj aŭ malnovaj partoprenantoj de tiu restado kun kursoj?

B) Ĉu vi ŝatus pasigi la Jarfinon kaj Novjaron en Greziljono dum pluraj tagoj?

C) Ni staĝo kun ekzamenoj PRINTEMPaS (gresillon.org/printempo) de la 17a ĝis 25a de aprilo atendas la unajn aliĝantojn (gresillon.org/aligho).

Kore salutas via Kulturdomo Greziljono. Bonvolu konsulti la retejon en Eo: gresillon.org/autune aŭ france: gresillon.org/automne ou

Kore salutas Bert.

Respondu al: kastelo@gresillon.org

Fungoj, en la sveda kaj en esperanto

trovitaj de Ingrid Vallin

kantarell – kantarelo



www.shutterstock.com · 1466464961


trattkantarell – funelkantarelo



taggsvamp – hidno



smörsopp – flava boleto



karljohanssvamp – boleto



mangebla blodriskar – dolĉagariko



Kremeca kantarela pastaĵo por kvar personoj

de Ingrid Vallin

500 gramoj da kantareloj

2 ajleroj

1 granda ŝaloto

1 ml da butero

1 hakita timiano

5 ml da salo

1 ml da nigra pipro

400 gramoj da pasto

200 gramoj da kapra fromaĝo

2 dl da acida kremo kun 15% da graso

2 dl de la pastoakvo

1 dl da dishakita grandfolia petroselo

Purigu la kantarelojn kaj tranĉu la plej grandajn en pli malgrandajn pecojn. Senŝeligu kaj tranĉu la ajlon kaj diserigu la cepon.

Rostu la kantarelojn en butero ĝis la plejparto de la likvaĵo forvaporiĝis.

Aldonu ajlon, cepon kaj timianon je la fino.

Salu kaj pipru!

Boligu la paston en salita akvo laŭ la instrukcio sur la skatolo.

Fortranĉu la krustojn de la kaprofromaĝo kaj pecetigu ĝin sur la kantarelojn.

Aldonu la acidan kremon kaj la pastoakvon kaj lasu ilin kunboliĝi.

Miksu la pastaĵon kun la kantarela miksaĵo.

Dissemu la petroselon sur ĝin kaj surtabligu!

Esperable ĝi bongustos!

Se oni ne havas kapran fromaĝon oni prenu alian forte gustan fromaĝon.

1 msk = 15 ml; 1 tsk = 5 ml; 1 kryddmått = 1 ml; ŝaloto= charlottenlök.

El la magazino *Veckan* de la jaro 1904

DIVERSLOKE

KIAM LA FRANCA PREZIDENTO faras vojaĝon per fervojo, li kompreneble veturas senpage. Sed tuj post la vojaĝo, la sekretario de la prezidento elkalkulas kiom la veturo kostus, kaj tiu sumo estas donacita al la plej malalte salajrita fervoja oficisto en tiu fervoja distanco.

TOLSTOJ kaj lia familio estas tiaj fervoraj ŝakludantoj, ke iliaj hundoj kaj katoj estas nomitaj laŭ la ŝakfiguroj.

EN LODZ, RUSA POLLANDO, oni malkovris la sekretan presejon de la socialisma gazeto "Robotniks", kies presejo estis longe serĉata. Sep personoj estis arestitaj. Tamen eldoniĝis

nova numero de la gazeto, en kiu la nomo de la denunciinto estis publikigita, kaj li poste estis trovita mortigita per ponardopiko.

VEGETARANA KUŜAĴO estas inventita de sir Isaac Pitman. Ĝi ne konsistas el plumoj aŭ lanugo, sed el musko, floroj kaj fojno. Tiun ĉi materialon kiel kuŝaĵon multaj kuracistoj opinias tre saniga. Jes, oni eĉ kredas, ke ĝi povas redoni la sanon al malsanuloj. Ĝi fariĝis tre fama en la vegetaranoj rondoj kaj meritas esti ĉie diskonigita. Ĝi odoras kvazaŭ "ozone", kaj oni diras, ke kiam oni dormas sur tia kuŝaĵo, ĝi donas ripozon same al la animo kiel al la korpo.

